

La Suda Kruco

Oficiala Organo de la Australazia Esperanto-Asocio.

Redakcio-Administracio : Abono (por dek du numeroj) :
Box 731F, Elizabeth-str: P.O., Aŭstralio: 4 ŝilingoj kaj 6 pencoj.
Melbourne (Aŭstralio). Ekster Aŭstralio: 5 ŝilingoj.

Specimena numero-unu respondkuponon aŭ 30 c. U.E.A. kuponon.

Unu numero: 4 pencoj

Anoncoj: Por 3 linioj: 1 ŝilingo.

N-ro 110 (Ninth Year)

Melburno (Melbourne), Aŭstralio.

10 August 1929

A MUNIFICENT BEQUEST.

£500 to Esperanto.

What is probably one of the most generous, if not the most generous, of monetary gifts ever made to Esperanto was recently announced at Christchurch, New Zealand, when the will of the late Mrs. Ensom of that town had been perused.

The honorary secretary of the N.Z. E.A. has been informed that Mrs. Ensom set aside the magnificent sum of £500 for the establishment of classes and for the instruction of Esperanto in Christchurch. Readers will appreciate something of the love which prompted our benefactress to make such a bequest by this extract from the testament:

"I give and bequeath the sum of Five Hundred Pounds (£500) to The Workers' Educational Association of Christchurch aforesaid for the establishment of classes in the International Language, Esperanto. I expressly request but without intending to create any legal obligation that a tutor shall be employed for the full course of classes and shall receive adequate remuneration and that Mr. Norman M. Bell, M.A., who has special qualifications for this work, and who has done much already to further public interest in the subject, shall be appointed tutor. The said classes shall be held at such times of the year as will ensure the best possible attendance of persons interested, irres-

pective of the terms of the academic year."

THE DIFFICULTY OF LANGUAGE LEARNING.

"Even so perfect a master of French literature as John Morley greatly disliked being called upon to speak in the French language. The fact that Viscount Bryce could address the German bankers in their own tongue, and the Historical Congress at Rome in Italian is considered by his biographer to be something worthy of comment." (W. Davies, "A World Outlook.")

"... Frederick the Great, after reading, speaking and writing French, and nothing but French, during more than half a century, after unlearning his mother tongue in order to learn French, after living familiarly during many years with French associates, could not, to the last, compose in French without imminent risk of committing some mistake which would have moved a smile in the literary circles of Paris." (Macaulay.)

Let the above be read in conjunction with the invariable testimony of widely travelled Esperantists anent the incomprehensibility of English as spoken by the vast majority of foreigners who try to express themselves in that medium. Whereas many an Esperantist can say that in the language of Zamenhof he has found the vesture wherewith to clothe an eloquence lacking to him in his mother tongue.

KENGOTTS'S POCKET DICTIONARY.

It is not likely that this little two-way word book will displace the present widely used "Edinburgh." The compiler has not listed many words of very frequent occurrence, on the ground that they are international and so presumably known to most readers of Esp-o text. This seems a faulty plan. Those who will use the dictionary will be for the most part learners who have no special faculty for discerning the "internationality" of this or that word's form, not to speak of its internationality of definition. Trivial, tron', trot', uzurp', konjekt', rikan' are omitted, for example; fazeol', frugileg', kariofil', kreton', kren', skorzonar', tropeol' are included. Why? The first are both literary and everyday words, the second are, speaking generally, limited to specialists. It would have been more satisfactory had the compiler used a system of abbreviations or signs enabling him to expand the derivative forms, set in smaller type.

Besides this fundamental defect of word omission, the booklet shows evidence of hasty preparation or careless proof-reading. What else can be responsible for the appearance in a dictionary of "ulcer: a soar"; entrepeno; granada, medecine, carier, naturtium, agil(e)? To define konkludi simply by "to conclude" is to facilitate the flow of an already fertile source of error with English Esperantists.

One would have expected in the grammatical outline complete treatment of the accusative case. The reader is not informed that omission of a proposition entails use of the N-case. (1) Mi iros london. (2) La muro estis alta tri metrojn. "Re" signifies also backward movement. "Uj" has been used for trees (pomujo), although this form is, owing to its lack of precision, now obsolescent. What is arbedo? The word "quantity" should appear after "da." Diveni means "to guess correctly"; we look in vain for konjekti! Domagi means also "to begrudge"; klopodi means rather "to bother about." With only this book's definition of krom, what is the reader to make of "mi mangis ĉiujn fruktojn, krom la pomoj"? Why "Munhen" and not "Varsovio"? "Spanish" and not "Russian"? Nord(1) pole; ŝmaci means to smack with the lips when kissing, G. schmat-

zen; funny—ridiga; In view of the presence of "Jesuo" throughout the Esp-o N. Test. and its preponderant use over "Jezuo," would it not have been better to list that form, even at the cost of personal preference? The name was discussed at length in "La Eklezia Revuo," Nos. 4/5.

Price 25c. through the A.E.A. or Amerika Esperanto Instituto, 604 Seventh st., Rockford, Ill.—(Robo).

OSSENDOWSKI ON ESPERANTO

Prof. F. A. Ossendowski, scientist, chemist and world-famed author, whose works, among them the sensational *Beasts, Men and Gods*, *Man and the Mystery of Asia*, *Behind the Chinese Wall*, have been translated into more than 20 languages, was asked his opinion on Esperanto. He said:—

"An I.L. is much needed, because the rapidity of presentday intercommunication, while permitting the nations to draw closer to one another, is yet to a large extent nullified owing to the extreme difficulty of intercomprehension. When Esperanto is accepted generally in foreign relations such hindrance will be done away, and the resultant exchange of thought among the nations will be productive of unexpectedly rich harvests.

"Esperanto can play an important part in diffusing among the peoples the fruits of a common artistic and literary life. Translation could be made for example from Polish into Esperanto and so spread throughout the world without the necessity for putting it into the many national tongues, which latter process is hurtful to the character and psyche of the works so treated."

It would seem that Ossendowski acknowledges the unique position held by Esperanto in the field of translation. By reason of its flexibility and freedom from cramping syntax, it enables the translator not only to mirror the word-order and compounds of the original, but also reproduce more faithfully than national tongues the mind of the author, for the vocabulary of Esperanto is comparatively free from those thought-associations peculiar to the words of national languages.

AELITA.

La Marso Formortanta.

Ankoraŭ aventura romano pri Marso, laŭdire vaste legata de la rusa junularo.

Fariĝoj sufiĉe frapaj sekvas unu la alian jam de kiam la raketomehanismo foriras de la Tero, kaj ili vigle daŭras veni ĝis la mirakla realteriĝo de la metalmonstro. Laŭ la modo ĉe tiaj skriboj neklera soldato, uzata de la aŭtoro kiel kontraŭpersono je brila sciencisto, provizas fluan daŭron, kaj la Marsa belulino, kies nomon ni uzas kiel titolon, donas amintereson.

Interese estas legi, ke "ĉie naskiĝas la vivo, kaj la vivon ĉie regas homsimilulo; neeble estas krei estaĵon pli perfektan ol la homo—bildo kaj similulo de la Mastro de la Universo." La uzo de "Peterburgo" supozigas, ke ĝi estis verkita antaŭ la revolucio.

Malfacilo ĉe romanoj pri supozata vivo aliplaneda kuŝas en tio, ke nur homo estas senti preskaŭan malpovecon imagi intelligentajn estaĵojn, kiuj havas ekzistecon tre malsimilan ol nia. Oni povas de la imago doni al ili flugilojn aŭ interpiedfingran membranon; oni povas pentri ilian regnan sistemon aŭ despota aŭ komunista, sed certe estas, ke oni sentos la malpovecon de la homa imago doni al alimonduloj korpoformojn kaj pensmanieron malsimilajn al tiuj de teranoj.

La stilo estas flumova, sed ni ne ŝatas "plaĉinda" (75), morta (mortinta); la verbo terur' estas transsonor' estas netrans. Sparko diferenca de ordinara fajrero en tio ke ĝi estas elektra, do uzita kiel maŝinfaka vorto.

200-paĝa, prezo 3/6 broŝurita, 4/6 tola per A.E.A.

Robo.

N.Z.E.A. DEPUTATION.

The deputation organised by the N.Z.E.A. for the purpose of placing the claims of Esperanto before the Minister of Education (Mr. H. Atmore) at Wellington, took place on the 12th July. Details will be made available for next month's issue. The Minister, has informed the deputation that, impressed with the information placed before him, he would investigate the question thoroughly and give the result of his consideration in two weeks.

KURSO PER TRADUKADO. (kondukata de s-ro George Gordon, F.B.E.A.)

Interesatoj turnu sin al f-ino Blyth, 10 Victoria-av., Surrey Hills, E10., Melb.

TRADUKO 15.

LA ŜARĜO DE LA NIGRULO (daŭrigata)

Antaŭ multe da (1) jaroj iuj proponis (2) alian planon por krei indigenan ŝtaton. Oni tre diskutis (2) ĝin, sed ĝenerale oni konsideris ĝin neplenumebla (3). Tamen la indigena teritorio en iaj rilatoj estus indigena ŝtato sen aŭtonomio.

Li nigruloj bezonas vastajn terojn por ĉasado, akvejojn (4), ne liberaĵoj al blankuloj, por siaj brutaroj, kaj liberecon por vivi laŭ siaj simplaj, naturaj moroj. Ili multmaniere suferas de la preno de sia tero por la brutedukado de la blankuloj.

Malgraŭ ĉiaj kontraŭdiroj kaj malakordaj atestoj, iliaj amikoj klare vidas, ke la indigenoj suferas pro la aplikado de la leĝo de la pliforto: Kvankam malfrue oni almenaŭ serĉas rimedon por pagi nian ŝuldon al ili.

La nombro de la nigruloj montrata en la raporto pri la lasta popolnombrado povas esti nur proksimuma kaj montras, ke en Aŭstralio estas ĉirkaŭ sesdek mil pursangaj indigenoj kaj pli ol dek sep mil mikstrasuloj. Kompreneble tiuj nombroj ne enhavas Tasmanian nigrulojn, ĉar la indigena raso de tiu ŝtato formortis antaŭ multe da (1)-jaroj.

Viktorio enhavas malpli ol sesdek pursangulojn, kaj pli ol sescent mikstrasulojn laŭ la oficiala popolnombrado. En Nova Sud-Kimrujo troviĝas multe pli ol tiom kaj Norda Teritorio enhavas dudek mil pursangulojn, nombron pli grandan ol ĉiu alia ŝtato.

Ankoraŭ en partoj de Aŭstralio oni povas kamploĝi inter kanibaloj! Tamen la kanabalismo ne estas tute tia, kian oni kunigas kun la kruelecaj indigenoj de iuj Pacifikaj insuloj.

Misiistoj faris multon por la bono de la indigenoj, kvankam ili ja iufoje erare faris, kaj etnologoj (5) aprobas ne ĉiujn iliajn metodojn. Oni devas permesi al la nigruloj libere vagadi senveste, praktiki la plimulton el iliaj kutimoj kaj ceremonioj. Tio estas la opinio de sciencistoj. Neniu indigena raso estas pli interesa ol la Aŭstral-

ia. Oni helpu al tiu ŝtonepoka popolo daŭri tiel, kiel volas Naturo, en aparta teritorio, rezervata sole por ili. (La Fino)

NOTARO 15.

Preseraro: Notaro 14, noto 2, "30/19" (20/19). 1. Pri "multe da" kaj "kelke da." Notaro 4/10. 2. Rimarku la uzon de aktiva formo anstataŭ pasiva por eviti kunmetitan verbotempon. 3. Predikata adjektivo. Notaro 1/7, 10. 4. "akvejo." Lev. 11/36. — 5. "etnologoj." Kiam nomo de scienco finiĝas per -io, oni povas forlasi la i por nomi profesoron de tiu scienco. kp. "teologio," "teologo," "astronomio," "astronomo."

AL NIAJ SUBTENANTOJ.

Danke ni kvitanco ricevon de abonoj jene:—F-ino Ryan, 4/6 ĝis junio '30; J. Modar, 5/- aŭgusto '30; N. Gaye, 5/-, aŭg. '30; F-ino Irwin, 4/6, junio '30; J. Pollock, 5/-, julio '30; N. M. Thomas, 4/6, junio, '29; S-ino Sainsbury, 5/6, anonco N. Cigno, julio, '30; R. J. Dodd 10/-, majo '30; M. Martinek, 4/6, junio, '30; F-ino Mitchell, 4/6, julio, '30; J. Thom, 5/3, aprilo, '29; F-ino V. Newnham, 4/6, aprilo, '30; M. S. Barnett, 4/6, marto '30 kaj 5/6 donaco; S-ino Wilson, 4/6, majo, '30; F-ino Conwell, 4/6, majo '30; Brisbane Grupanonco 5/6, majo, '30; L. Glynn 10/-, aŭg., '30; D. Guilbert, 4/6, junio '30; J. Girdwood, 4/6, junio '30; f-ino L. O'Connor, 4/6, junio '29.

GRAVA ALVOKO.

La Kristana Esperantista Ligo Internacia (K.E.L.I.) fondita en la jaro 1911a, bazita sole sur la sankta Biblio, sendependa de eklezio dogmo, dissendas al la Kristanaj Asocioj de Junaj Viroj (angle: Young Men's Christian Association), al la Kristana Penado (angle: The Christian Endeavour) kaj al aliaj, alvokon, lerni Esperanton. La tuta Esperantistaro, kiu simpatias kun tiu laboro estas petata, iamaniere helpi, ke la grava entrepreno bone sukcesu. Helpo povas okazi per traduko kaj transdono de la alvoko al kristana societo, per sendo de informo pri interesuloj al K.E.L.I., adreso: Paul Hubner, Polkenstrasse 4, Quedlinburg (Germanlando), krom tio per monsubteno. Ju pli da helpo, des pli rapide okazos la disvastigo de la alvoko.

INTERNACIA FRAZARO: CIUTAGA VIVO.

Jen du libretoj por tiuj, kiuj antaŭ ĉio volas utiligi Esp-on per interparolo-korespondado. Vivoplene originale verkitaj frazoj enhavos por strat- kaj socivo vortprovizon internacistile prezentitan. Ĉe "C.V." listoj de demandoj pri la antaŭe metitaj legajoj instigas lernantojn dekomence langlertiĝi kaj akiri facilan parolpretecon. Notitaj estas kelkaj vortoj pri kiuj ni volus altiri reatenton de la aŭtoro, s-ro Kengott. "oromitaj" (oritaĵ); inklusive (z); laternfostoj (lantern-); neakurataj tradukoj (nefidindaj, nebonaj)? Ankaŭ iuj preseraroj okulpiki sidas sur la cetero belaspektaj paĝoj de ambaŭ libroj.

"I.F." Kial "Avenida" de la Stacidomo? Atendigi (atentigi), frostosveloj (ŝ). Diskuteblaj formoj: sekvi laktan dieton (nutriĝi per lakta dieto); la perdo, kiun mi faris (. . . kiun mi suferis; kiu okazis al mi); neriparebla ĝi (mortperdo) estas! (nekompensebla); ni ne mankos veni (ni nepre venos). Pargeto cirita (vak-sita); situata (situanta); jupono (subjupo); oferi (ĝuste uzita en C.V., sed ĉe "oferi cigaredon" estas malbone; proponi; Zamenhof uzas "oferi" ĉiam en la senco de la Angla "sacrifice"); restaŭracio (o); ne necesa estas "starti," (ekiri, ekfunkcii); kabino (ka-juto); ankrigita (ankrita); balanco (iĝ); dramatika (dram(ist-ec)a); orkestro homogena (bone konsistigita?); trieto, filmbendo (?).

Aĉetindaj lerniloj kaj formtrezoroj por la praktikulo.

Prezo 25 cendoj, Amerika Esperanto-instituto, 604 Rockford-st. Ill. U.S.A.

(Robo)

IMPORTANT TO TEACHERS!

The Pan-German Union of Teachers, with more than 150,000 members, at its congress in Dresden in May 1929 accepted the following resolution:—

"We urge that every effort in pedagogic circles to forward the diffusion of a world auxiliary language be supported by the Union."

It is asked that all teaching publications reprint the above, as success can be attained only by a similar advance in other countries. Esperanto-Instituto por la Germana Respubliko, Leipzig, W31. -Seumestr. 10. Germ.

KRONIKO.

MELBURNO. — La 27an de junio verduloj kaj geamikoj dediĉis al Terpsihore ĉe La Rivoli, Collins-str., kie ili ĝuis la plezuron de la danco k. interparolo. Gaja muziko altigis la spiriton, k. per frandaĵoj la duope-kirlantoj refreŝigis. Proks. 90 ĉeestis la ĉiel-sukcesan aferon. Tial, la Melburna societo aranĝos dancadojn kiel eble plej ofte.

La 3an semajnon en julio decidiĝis en la societejo Esp-a konkurso. La anoj vigle partoprenis, k. la premian gajnis f-ino M. Bostock. Krom amuzi, tiaj amuziloj multe alinstigas al pli forta intereso en la studo de Esperanto.

WELLINGTON:—La dissemo daŭras. Pasintmonate s-ro C. Priestley rakontis sian sperton ĉe internacia kongreso de E-to. S-ro Potts gvidas priesperantan kolonon en la gazeto literatura "New Zealand Life." Altgrade verkita, lia laboraĵo sendube allogos al Esp-ismo.

La sek-io de N.Z.E.A., kies ĉefsidejo estas en nia urbo, nun esploras proponon okazigi N.Z. Esp-o kongreson. F-ino Belcher, el Melb., bonvene vizitas al Wellington.

OKOROIRE:—S-ro instruisto J. Hodges, F.B.E.A., malnova laboranto por E-to, instruas klaseton ĉe sia lernejo ĉe Tapapa.

MASTERTON:—Je la 17a de junio la grupo adiaŭis s-ron Aurthur, kiu translokiĝas al Hawera. Kiel signon de atestimo la membroj donacis al li Sanktan Biblion. La grupo regule kunvenas, kaj s-ro Dewar koresponde instruas kelkajn loĝantajn en kamparo. Sino Payne vigle aperigis en la loka gazeto ampleksajn artikolojn pri akcepto de E-to de la internacia Rotario ktp.

AUCKLAND:—Speciala societkunveno okazis en la 14a de junio, kiam ni bonvenis du vizitantojn—s-inon Druary el Christch, k. s-ron Clark, el la Sidneja klubo: ĉi-kui nun loĝas en nia urbo. Entuziasmulo, s-ro Clark efike helpas disvastigi la lingvon ĉe

ni. Loka firmo, Whitcombe k. Tombs, posedas jam provizon de la "Esperanto Teacher," de Helen Fryer.

CHRISTCHURCH:—La societo, jam 31-ana, pligrandiĝas. Je la 3a de junio, de 7.30 ĝis 7.45 vesp., s-ro N. Bell, M.A., prez. de la societo, parolis de 3YA (Christch.) pri E-to. Li temigis la vivon de d-ro Zamenhof, lian naskokon, k. lian majstroverkon por la mondo.

S-ro Bell similigis E-ton al spirita pinto de unu lando al alia. E-tistoj ne volas forigi sian gepatran lingvon; aŭ tiun de kiu ajn lando, sed volas uzi E-ton kiel ŝlosilon por malfermi al si la spiritojn de siaj fremdaj fratoj. Li finiĝis verdlingve per ŝerakonto, kiun li tujposte tradukis anglan.

SIDNEJO:—La ĉiujara kunveno de la Sidneja Esp. Soc. okazis la 28an de junio. Oficistoj elektitaj por la venonta jaro:—Prezidanto, s-ro Pryke; vicprez-oj, s-roj H. Torr kaj Winter, s-ino Fleming; sekretario, s-ro L. Pfahl; kasisto, s-ro H. Davies; helpa sek-io, f-ino F. Fleming; bibliotekisto, f-ino Smith, librokontrolisto, s-ro Rutland. De la sek-io kaj kasisto estis akceptitaj raportoj, montrantaj progreson de E-to en Sidnejo. Estis diskutate, ĉu kotizo al la klubo estu pliigita ĝis 15/- anst. 10/- jare. Oni maljese decidis. Tre malnova Esp-isto, s-ro R. Swainson, O.B.E., D.B. E.A., paroladis en junio pri "Fruaj Esp-istoj." Interese estis, renkonti homon parolintan kun la Majstro k. la famaj pioniroj de nia lingvo.

QUERY CORNER.

Readers are invited to send in questions of general interest bearing on Esperanto grammar, history and suchlike.

W.E. in T. The principles of sufficiency and necessity in Esperanto word forms were formulated by Rene de Saussure in 1916. One may use "konstruo," "manĝo," "alto," "trinko" instead of the forms with "aj" when the meaning is clear. See Gen. 24/33, Mart. 6/1 and 7, Hamleto 68/

SANO — SANA — SANIGA. DO YOU ENJOY GOOD HEALTH?

Thanks to Esperanto, Australia is now able to benefit from Switzerland's foremost medical discovery, NOVOCHIMOSIN (Novo-Kim) which is a remedy for every type of gastro-intestinal disorder and its sequels. "Incurable" cases yield to this remedy, which contains no drugs or chemicals, being a biological product.

All chemists CAN supply "Novo-Kim" or it will be forwarded upon receipt of a P.N. for 5/- by the agents: The Saniga Company of Australia, P.O. Box 1106, Melbourne.

31, Levidoj 14/29. "Orumi" and "butonumi" are not necessary, for there is no difference between them and "ori" and "butoni."

Beno. Zam. uses "hordo" in the sense of "bando" on p.6 Rabeno de Baharah. "Intuicio" on p.147 of "Marta."

Y.O. in W.—According to the Fundamento "spite" is an adverb, not a preposition. Consequently it should be followed by the accusative or the preposition "de" or "al," but Privat and other experts often use it with the nominative. Zamenhof writes "spite al la diablo" Rabistoj 40/26, F.K. 286/23, "spite ĉiuj argumentoj," and at Ps. 27/11, "spite miajn insidantojn." The prepositional use is the more frequent. This is a point the Lingva Akademio should definitely settle.

A.T. in St. The first Esp-o gazette was "La Esperantisto" published in Nuremburg from 1889 till 1895. This was superseded by "Lingvo Internacia" (1896-1915), at first printed in Upsala (Sweden), then in Budapest, and finally at Paris. The first group of Esp-ists was that at Nuremburg, in 1888, consisting of ex-Volapukists.

NOTU!

Pro presista fuŝo la paĝoj de lasta n-ro misaranĝiĝis. Faru ke 93 estu 95, 94—96, 95—93, 96—94.

ILUSTRITA BIBLIOTEKO.

La Maro. (N-roj 6-10.) Tole bindita en unu volumo, 172pp., 3/9. Ankaŭ en apartaj volumoj: (1) *La ŝipĉarpentisto*, rakonto de F. Gerstacker el la marista vivo, tradukita de Egruho el la germana, 59pp., 1/-. (2) *El "Navigado estas necesa"*, de Gorch Fock; *Kaprico*, Originala rakonto de D. P. Boatman, *Aĝio de la "Semillante"*, de Alphonse Daudet; 32pp., 6d. (3) *Gudrun*. Rakonto laŭ la konata mezepoka germana eposo, verkita de Teo Jung; 40pp., 6d. (4) *La Hantataj ŝipoj*, novelo de Allan Cunningham; *Suldpedelo sur la Maro*, novelo de W. Clarke Russell; elangligitaj de L. N. Newell kaj K. R. C. Sturmer; 40pp., 6d.

La entreprenema "Heroldo de Esp-o" daŭro naskas legaĵojn tre diversajn. En la rakontoj primaraj abundas teknikaj vortoj, el kiuj kelkaj ŝajnas nenecesaj. Enverŝado de neologismoj tute ne montras sur la interpeteoj de nia lingvo. Kion ekz. signifas por Aziano "tempesto,"

trano, taklaĵo, kvoto, imensa, bruske, barto, eskapi, tomohaŭko, dura, kaj, blazo"? "La ŝipĉarpentisto" enhavas aventuron de forkurinta maristo, kiu, trafinta insulon, adoptas la vivmorojn de la tiea popolo. Alveninta ŝipestro sukcesas allogkapli lin kiel denovan maranon. Pri lia prospero fine reveni tra danĝero al la amata indiĝena edzino ktp. la legontoj sciigos. Ne ŝatinda estas "lando" anst. "tero," jamo (ignamo), "foje" misuzita, kurso (vojiro), depremi (melankoliigi), eldoni (forpeli), distrikto (regiono), skrupule (zorgege).

En n-ro 8 la plejbona estas "La agonio de la Semillante." "Navigado estas necesa" iom pezas pro tekniklingvaĵo. Ekz., "... terure knarantaj gafoj kaj tondrantaj ŝkotoj tangadis la evero." "Je la baborada flanko ili ŝeklis drivo-ankron."

N-ro 9 klare verkita de s-ro Jung. Ĝi rerakontas la fidelecon de bela Gudrun. Ĉi malnovepoka historiaĵo precipe allogos por tiuj sukcesantaj eviti la urĝvokon de la aktualeco. "Tagoj estas jam nombritaj" ŝajnas Anglaje. "Strando" (A. beach; kp. plaĝo, sablejo).

N-ro 10. Traduko el la Angla, ridiga estas "Suldpedelo" verkita originale de tre konata mar-genristo. Ĝi lerte transdonas iuloke la guston de la Anglaĵo. "Firmterula" pedelo spertas tion, kio signifas la kuna kolero de maro kaj ŝipanaro, Kontraŭ kiuj li estas procesa instrument. Superŝiĉo, prikobolda timo de la apudmaraj ŝkotoj respeguliĝas en "Hantataj ŝipoj" verkita de amiko de Walter Scott kaj T. Carlyle. Kial "likva" (fluida), rigilaro (A. rigging), graŭlis, novlanda (?) hundo, ĉi tiam! "la sorto iom pli ol favoris la pedelon (?)

Legante, oni ankaŭ studos ĉi marlibretojn.

(Robo)

BONAJ LIBROJ.

"Iu deinfanaĝa emo al legado kaj intelektaĵoj" diris Thomas Hood "tre ŝajne savis min el la moralpereigo, kiu tro tro ofte trafas tiujn, kiuj fruaĝe suferas perdon de gepatra gvidado. Miaj libroj malemige fortenu min de la kunuleco de boksistoj, drinkemaj amikoj, kaj hundbatalejistoj. La perlibre intima amiko de Pope kaj Addison, aŭ la homo, kies menso jam kutimiĝis al la nobla kvankam silenta interparolado kun

Shakespeare kaj Milton preskaŭ neniam alserĉas aŭ senreziste toleras la kunulecon de fianimaĉoj kaj sklavoĵ sub malmoraleco."

(trad. Robo)

REVIEW.

Communism looms so large these days in discussion of political questions that an authoritative statement of its theory and principles is welcomed.

This book is the official programme of the Communist International, adopted at its world congress last September.

It includes a comprehensive analysis of the capitalist system (with special reference to the present era of imperialism), an eloquent exposition of "The ultimate aim of the Communist International — World Communism," an explanation of "the dictatorship of the proletariat" and of Communist revolutionary policy, and, finally, an outline of the strategy and tactics of the Communist movement.

It is a compact expression of Communist thought and a necessary document for all students of political theory, whether opponents or sympathisers of revolutionary doctrine.

"Communism: the Programme of the Communist International." A Baker, 395 Sussex Street, Sydney. 100 pages. Posted 1/1.

S-ro Masaharu Kaŭakiŝi

Enami-Maĉi, Tojama-Ken,

Japanujo,

deziras korespondon pri la literaturo, kino, interŝanĝi ipk.

LANGUAGE QUESTION PROVES PROBLEM AT SCIENCE CONGRESS

Delegates Could Not Understand Speeches.

English was the official language of the delegates at the recent Pan-Pacific Congress in Java. Dr. Marshall, of Wellington, who represented the New Zealand Institute at the

congress, said that the universal use of English in such a congress might sound all right in theory, but it worked out very differently in practice. The language question was a very great difficulty. The Dutch and French could not understand the English of the Japanese, the Japanese could not understand the French or Dutch, nor the English spoken by most of the Americans. The Japanese, however, could understand the Englishmen's English.

"It makes one wonder," he added, "if Esperanto will be able to do what is claimed for it. English is spoken in all parts of the world, yet these different people could not understand one another."

Dr. Marshall mentioned that the Japanese and Chinese were able to talk to one another and that their English was understandable to the Englishmen. The Japanese talked very slowly. The language difficulty had caused a certain amount of confusion.

"The Japanese were very disinclined to talk," he said, "for they felt that they would not be fully understood and that if they did speak they might make themselves ridiculous."

Dr. Marshall visited a similar congress at Tokio two years ago, but he said the language difficulty was more noticeable on this occasion. "There was a greater mixture of nationalities," he remarked.

DUM EKSPERIMENTO.

— Kial en ĉeesto de malsanulo ni parolas latine?

— Estas necese kutimigi lin al la morta lingvo.

ELLERNU ESPERANTON!

Tio signifas lernu tiel, ke vi sciuj ĝin perfekte. Via ambicio estu esti ĝin tiel, kiel vi estras vian lingvon ĝepatran. Tiam vi konstatos kia mirinda beleco kaj kapableco ekzistas en Esperanto.

HAROLD PUDNEY

Se vi havas kriplan fontanplumon, kiu malhelpas vian skribadon portu ĝin al li, kaj li malkare rebonigos ĝin. Aŭ ĉu vi deziras fontanplumon POR VI MEM AŬ POR VIA AMIKO? Li havas multajn el ĉiuj specoj, je prezo facila por via monujo. Li speciale prizorgas mendojn per poŝto. Memoru la adreson

7 **EQUITABLE PLACE, MELBOURNE.**

Specialisto pri Fontanplumoj

VALORA OPINIO.

Eldiroj de D-ro C. Th. Dumba, eksambasadoro aŭstria en Usono, prezidanto de Aŭstria Societo por "Ligo de Nacioj," okaze de lia parolado pri "Ligo de Nacioj kaj la germanoj" en I. Esperanto-Unuiĝo en Wien, la 11.1. 1929.

Mi estas konvinkita, ke la ekzisto kaj la ĝenerala alprenado de tia interkomprenigilo, kia estas Esperanto, efike akcelus kaj plirapidigus la mensan interproksimiĝon de la nacioj. Tion konsiderante ni salutas la esperantistojn kiel bonvenajn samliganojn, al kiuj ni povas apenaŭ sufiĉe danki pro ilia pionira laboro. Mi mem havis dum iom longa tempo la impreson, ke la angla lingvo estas la mondlingvo kaj povus anstataŭi Esperanton. Sed nun mi kredas, ke la spirito de tiu lingvo estas tiom fremda al tiu de la latinidaj lingvoj, ke la latinidlingvaj nacioj nur tre malfacile povus ellerni la lingvon anglan, kaj ni tute ne parolu pri la malfacilaĵoj prononcaj.

Tial mi opinias, ke Esperanto speciale por Eŭropo estas eksterordinare valora interkomprenigilo, al kiel disvastiĝo kaj fina venko mi deziras plejan sukceson.

SUR STRATO.

- Pro kio ci ploras?
- Patrino donis al mi mian naskiĝcertigilon, por ke mi alportu ĝin al la lernejo, kaj mi perdis ĝin.
- Nu, kaj kio?
- Nun mi devos denove naskiĝi...

LA NUNTEPAJ VIRINOJ.

Sur la strandbanejo pliaĝa sinjoro alparolas tian najbaron:

- Vidu, kiel ideale belan korpon havas tiu knabo, ĉu ne?
- Ne estas knabo, sed knabino.
- Ne diru, estas ja knabo!
- Tute ne knabo! Ŝi estas ja mia filino!
- Tiel! Do vi, sinjoro, estas ŝia patro!
- Ne! Mi estas ŝia patrino.

FORTA VOLO.

- Mia edzo tute dekutimiĝis de la fumado.
- Oni devas havi fortan volon por tio.
- Ho, tian mi havas.

Westralian Esperanto Society, Nigra Cigno Grupo, kunvenas ĉiun vendredon de 7.30—10 p.t. ĉe 197 Murray-st., Perth, kontraŭ Boan's Ltd. Prezidanto, s-ro H. Byatt, D.B.E.A. Sekretario, s-ino E. Sainsbury, "Noeline," Carrington-st., Maylands, W.A.

Masterton (N.Z.) Esperanto-Grupo. Prezidanto, S-ro A. Dewar; Sekretariino, S-ino L. Payne, 8 Bruce Strato. Kunvenas en ĉiu lundo je la oka horo vespere en la kunvenejo ĉe la Y.M.C.A.

AUCKLAND (N.Z.) ESPERANTO SOCIETO kunvenas la duan lundon de ĉiu monato je 7.45a horo vespere ĉe Nov-Preĝejo Halo (New Church Hall) Newton Road. Prezidanto: S-ro J. S. Russell. Sekretariino: S-ino E. M. Watkin. Komunikaĵojn al la prezidanto ĉe Kent's Buildings, Newmarket, Auckland.

Melburna Esperanto-Societo, Prezidanto, s-ro J. Skurrie; sekretariino f-ino V. Cox. Poŝta adreso, Box 731F, Elizabeth-str. P.O., Melbourne. Kunvenejo: Room No. 3, Temperance Hall, Russell St. Marde vespere, je ol oka horo.

Sydney Esperanto Society. Kunvenas ĉiun ĵaŭdon de 8-10 p.m. Ĉe dua etaĝo, "Manning Building," 449 Pitt Street, Sydney. Kontraŭ "Hotel Sydney" kaj apud la ĉefstacidomo. Prezidanto; s-ro E. A. Pryke; Sekretario: s-ro Leslie E. Hall, 174 Burwood Road. Burwood.

Brisbana Esperanto-Societo kunvenas la 2-an kaj 4-an mardojn de ĉiu monato en salono de State Service Union, 59a Elizabeth-str.; proksime de konstruaĵo "State Insurance." Prezidanto: Klement Kidd. Vicprezidantoj: Fraŭlino Rose Macpherson; M. Hyde. Sekretario: Fraŭlino E. B. Carrick, Office of Supt. of Telegraphs, G.P.O., Brisbane (Kvinslando-Quensland).

WELLINGTON ESPERANTO CLUB.—Meets every Tuesday, 8 p.m., in the Y.M.C.A., Willis St., Wellington. Visitors always welcome. President, Mr. E. C. Jack; Vice-President, Miss Coralie Smythson; Secretary, Mr. Bertram Potts, F.B.E.A., 34, Argentine Ave., Miramar; Treasurer, Mr. L. E. Dust, D.B.E.A., Del., U.E.A. Write for book list.